# TEA-BULTENO

2ª JARO | FEBRUARO 1999 | NUMERO 2





## AGENDO



| | | |
|---|---|---|
| 1 | L | Konversacia rondo |
| 2 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 3 | M | |
| 4 | Ĵ | Unuagrada kurso |
| 5 | V | Ludkarta vespero |
| 6 | S | |
| **7** | **D** | |
| 8 | L | Konversacia rondo |
| 9 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 10 | M | |
| 11 | Ĵ | Unuagrada kurso |
| 12 | V | Pasintaj Karnavaloj en Tea |
| 13 | S | |
| **14** | **D** | |
| 15 | L | Konversacia rondo |
| 16 | M | Karnavalo en TEA |
| 17 | M | |
| 18 | Ĵ | Unuagrada kurso |
| 19 | V | Videofilmo en Esperanto |
| 20 | S | |
| **21** | **D** | |
| 22 | L | Konversacia rondo |
| 23 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 24 | M | |
| 25 | Ĵ | Unuagrada kurso |
| 26 | V | Muzik-vespero: kantoj el la mondo |
| 27 | S | Semajno de Internacia Amikeco |
| **28** | **D** | |





Esperanto faligos la barojn, kiuj de jarcentoj disdividas la homaron. *D-ro A. Ghez*

# Ĝenerala Asembleo de TEA

## dimanĉon la 10an de januaro 1999

## Morala raporto de la Prezidanto

*Edvige Ackermann*

Nova jaro, nova asembleo, novaj raportoj. Ĉi lastaj, ĉu vere novaj? Mi havas la impreson, ke delonge, okaze de la ĝenerala asembleo, la vortoj ripetiĝas, la alvokoj pri kunlaborado, pri iom pli da engaĝiĝo, restas senrespondaj. Sojle de la mita jaro 2000, necesas iom pli profunde trarigardi nian laboron, nian personan kontribuon, nian volon pluokupiĝi pri la internacia lingvo Esperanto.

La ĵus pasinta 1998 estis jaro de gravaj eventoj por nia TEA kaj ankaŭ ĝenerale por Esperanto en nia Regiono.

TEA estis plene engaĝita en la organizado de du manifestacioj, kiuj bonege sukcesis kaj montris plue, ke nia skipo kapablas efike, moderne kaj verve (modesteco ne troviĝas inter miaj virtoj!) labori meritante la estimon kiun ni vaste ĝuas. Mi parolas pri la 10ª Alp-Adria Konferenco, kun ties Seminario por instruistoj, tre alte taksata fare de la partoprenintoj, pri la kunlaboro kun la Festivalo de Itala Esperanto-Junularo, ambaŭ okazintaj dum la Paska tempo en *Lignano Sabbiadoro,* kaj mi parolas pri OSIEK-Konferenco, julie, en Triesto. Ni ricevis bonegan subtenon fare de la regionaj kaj lokaj instancoj, atenton de RAI3 kaj de la gazetaro vere kontentigan. Sed permesu ke mi rememoru kelkajn detalojn kiuj aparte kronis la aferojn: tio estas la partopreno en la inaŭguro de la aranĝoj en *Lignano* fare de la regiona deputito Antonio Dibisceglie, kun kiu ni starigis iaspecan kunlaboron, la aktiva partopreno de nia vicurbestro prof. Roberto Damiani en la malfermo de OSIEK-Konferenco pere de prelego pri «Triesto, ekde la origino ĝis hodiaŭaj tagoj», kaj la aperigo de broŝuro «La Romepoka Triesto».

Mi bedaŭras, ke en tiuj ĉi aranĝoj, altnivelaj, interesaj, kulture riĉaj, ne ĉiuj povis aŭ volis partopreni: estis granda ŝanco havi ĉedome tiajn eblecojn, kutime oni devas foren vojaĝi kaj multe elspezi por ĉeesti ion similan.

La kunlaboro kun la deputito Dibisceglie temas pri apogo ĉe la Komunumo de *San Vito al Tagliamento* por titoligo al Antonio Paolet, pioniro de Esperanto en nia regiono kaj ankaŭ en Italio, de ia ZEO, kaj por realigo de Esperanta agado en tiu urbeto. Pri Paolet ni sukcesis akiri promeson pri titoligo de la renovigota urba biblioteko lianome; pri la dua temo ni organizis – kunlabore kun Flavia Dal Zilio el *Treviso*, vicprezidantino de Itala Esperanto-Junularo – ekspozicion pri Esperanto kaj kun-

venon de gejunuloj aktivaj en nia movado, kaj, kunlabore kun Manuel Rovere el *Udine*, kurson, kiu bedaŭrinde malsukcesis, sed mi havas esperon pri ĝia baldaŭa realigo.

Do, el ĉio ĉi vi povas kompreni kiom intensa estis la agado – sen mencii la klopodojn vivigi la societan etoson, la aperigon de bulteno, ktp ktp – por nia skipo laborinta ne nur en Triesto sed ankaŭ en aliaj partoj de la Regiono.

Helpo kaj kunlaboro fare de pluraj homoj okaze de la aranĝoj tute ne mankis, kaj varma danko iru al ĉiuj kiuj dediĉis liberan tempon kaj forton por ilia sukceso. En similaj okazoj, mi scias, ke oni konkrete povas kalkuli je vi ĉiuj. Tio, kion mi devas ankoraŭfoje substreki, estas la malinteresiĝo por nia asocia vivo, por nia konstanta, ĉiutaga (aŭ preskaŭ) agado, por la sukceso de la Esperanto-kursoj. Ni ne havas magian recepton por ĉion vivigi: por tio ni bezonas vian sugeston, vian ĉeeston, vian partoprenon, vian transprenon de simpla tasko, ĉar ĉio farita de unu el vi permesas al iu estrarano okupiĝi pri alia temo, eble pli komplika, eble pli temporaba.

Nia ĉefa tasko estas la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto: en 1998 ni ne sukcesis startigi bazan kurson. Niaj rimedoj ne sufiĉis, eble ili estis netaŭgaj, ne sufiĉe allogaj, eble informado lamis. Kaj ĝuste ĉi tie ni bezonas la helpon de ĉiu unuopa membro de TEA. Se ĉiu el ni ludos sian rolon, sukceso ne povas longe foresti. TEA insistos organizi kursojn: aktiviĝu, donu vian kontribuon, ebligu efektivigon.

Mi invitas vin, ankoraŭfoje, pensi al la estonteco de nia Asocio, al la ĝisnunaj atingoj, gravaj sed samtempe modestaj, al la defioj en la kampo de interpopola komunikado, al la ŝancoj de Esperanto en la nova Eŭropo. Estu certa, ke nenio okazos hazarde, sed nur sekve de niaj konduto, agado, persisto: bonaj rezultoj postulas daŭrajn interesiĝon, subtenon, partoprenon.

Ankaŭ en viaj manoj troviĝas la ŝlosileto kiu povos malfermi, aŭ fermi, la pordojn por Esperanto.

## Agadraporto de la sekretario

*Elda Doerfler*

Estimataj TEA -anoj!

Laŭkutime, dum la ĉiujara rendevuo, mia tasko estas prezenti kion la estraro entreprenis kaj disvolvis en la pasinta jaro, por plenkonscie pritaksi la faritaĵojn.

En 1998 ĉefis du manifestacioj, kiuj pleje okupadis, ĝis duono de la jaro, kaj la estraron kaj plurajn anojn de TEA. Tiuj estas la **10ª Alp-Adria Esperanto-Konferenco** kaj la **Internacia Esperanto-Konferenco '98** kunlabore kun OSIEK.

La unua okazis en *Lignano Sabbiadoro* de la 8ª ĝis la 14ª de aprilo, samtempe kun la 22ª Internacia Junulara Festivalo. Enkadre de la Alp-Adria Konferenco estis organizita ankaŭ **Seminario pri instruado**. Kvindeko da personoj ĉeestis la aranĝon. La organizintoj ricevis favoran reagon de la partoprenintoj, kiuj estis plene kontentaj kaj pri la loko elektita kaj pri la konferencejo kaj ties priservado. Alia kroma kaj pozitiva rezulto de tiu konferenco estis la ekinteresiĝo, kiun sekvis tre konkretaj proponoj de la parlamenta deputito d-ro Dibisceglie. Interalie, danke al lia apogo, en *San Vito al Tagliamento* la urba Biblioteko ricevos la nomon de la eldonisto A. Paolet, la tre konata Esperanto-pioniro de nia regiono. Krome notindas ke, zorge de la Turisma Entrepreno de *Lignano Sabbiadoro*, estis eldonita esperantlingva prospekto pri tiu fama turismejo.

Pri la **Internacia Esperanto-Konferenco '98**, organizita de la 18ª ĝis la 24ª de julio, plus tri aliaj ekskursaj tagoj, direndas ke la kvindeko da partoprenintoj plene ĝuis kaj la prelegan kaj la distran/turisman partojn. Por ĉi tiu aranĝo la estraro ricevis la helpon de vigle kunlaborema TEA-grupo, kiu malŝarĝis ĝin plenumante diversajn laborojn ĉefe en la konferencejo kaj dum la posttagmezaj vizitoj al muzeoj k.s.

**Programoj en klubejo**: ekde multegaj jaroj, malgraŭ la ĉiudirektaj streboj, evidentiĝis ke unu el la plej grandaj malbonaj ecoj de la estraro estas la malkapablo kontentige prezenti interesajn kaj allogajn programojn. Fakte nenio ŝajnas sufiĉe interesa por ke, krom la prizorganto, kunestu minimume kvin aliaj personoj. Malgraŭ la elrevigaj rikoltoj tamen ni ne malkuraĝiĝas kaj daŭrigas proponi ion. Dum la jaro okazis diapozitivo-projekciadoj pri Aŭstralio, Ĉipro, Francio, Hindio, Italio, prelegoj pri elstaraj movadanoj, pri UEA kaj ties historio, raportoj pri partoprenitaj kongresoj/kunvenoj, la tiel diritaj «ekskurso tra la vortaro». Substrekindas la prelego pri gnostiko zorge de Anna Rustici, kiu tre bone sukcesis informi nin pri tiel malfacila temo. Varma danko adresendas al la persistemaj samideanoj kiuj – senkonsidere de la pluraj vakaj sidlokoj – preparis sin kaj pristudis temaron por vigligi la klubejajn vesperojn: Edvige Ackermann kaj Anita Altherr. La plej sukcesa ero de nia programaro tamen ĉiam estas la komuna vespermanĝo, ĉijare okazinta du fojojn (laŭ frandemuloj, ĉiam tro malmulte!): dankindas por tio la eminentaj gekuiristoj Susy kaj Silvio.

Okaze de la tradiciaj Esperanto-renkontiĝoj, feliĉe triesta samideanaro sufiĉe nombre ĉeestis. Oni festis en *Ljubljana* la **Semajnon de Internacia Amikeco**, organizitan de la loka grupo: tio la lastan dimanĉon de februaro. Bedaŭrinde pasintjare, pro pluraj malfavoraj cirkonstancoj (unualoke la pluva vetero), neniu el ni ĉeestis la **Feston de Amikeco en Arnoldstein**: ni esperu ke ĉijare tiu bela renkontiĝo estu ebla. Okaze de la **Zamenhofa Festo**, pasintdecembre, oni respektis la tradicion, nome okazis Diservo esperantlingva kun kristnaskaj kantoj zorge de parto de la virina koruso IVAN GRBEC, kaj memorig-parolado honore al nia Majstro, sed aldoniĝis io nova, kio ricevis plenajn konsentojn de la plimulto. Okazis gastronomia konkurso kaj la ĉirkaŭ tridek-kapa juĝantaro esprimis sian kontenton per altaj poentoj al la elstaraj kuiristinoj.

Pro troa okupiteco pri organizado de du konferencoj, eblis **ekskursi tra Slovenio** nur unu fojon, en junio: tre belan viziton al la romiaj monumentoj de Sempeter kaj al la groto Pekel preparis por ni ESPERANTA TURISMA SOCIETO LJUBLJANA.

Pri **kongresoj/konferencoj k.s.**: rekorda nombro da triestaj geesperantistoj en la UK: dek kvar TEA-anoj svarmis en la Montpeliera kongresejo! Krom tio, oni partoprenis en diversaj aranĝoj okazintaj en Barato, Italio, Nederlando, Svislando.

Nun iom da ciferoj: TEA akiris en 1998 6 novajn anojn, sed jam prezentis por la nuna jaro aliĝ-demandon 4 aliaj personoj. La estraranoj kunsidis entute 6 fojojn,

sed atentigendas, ke dum la tuta jaro iliaj interrilatoj konstante oftis preskaŭ ĉiusemajne. Estis ricevitaj 75 leteroj kaj elsenditaj 90. Notindas ke en tiuj nombroj ne estas enkalkulitaj la pluraj ret-mesaĝoj ricevitaj de Edvige Ackermann kaj, rilate al la elsenditaĵoj, ne enkalkuliĝas la multobligitaj cirkuleroj, invitleteroj, varbiloj, faksoj al ĵurnaloj/radioj, k.s. Daŭre nia asocio situas en **interreto**, danke al klopodoj de Edvige Ackermann kaj Federico Schreiber, kaj baldaŭ triesta komunumo donos al ni, senpage, kunligon al *Internet*, pere de kiu eblos pli efike labori en tiu kampo.

Kiel kutime, oni klopodis konstante informi la diversajn lokajn ĵurnalojn, radiajn kaj televiziajn staciojn pri la priesperantaj okazaĵoj, foje sukcese foje malsukcese.

La presmaŝino daŭre kaj diligente funkcias sub la direktado de Giuseppe Valle, por liveri propagandilojn, invitleterojn, bondezirbiletojn, ks. En 1998 ĝi multe laboris pro la programitaj aranĝoj kaj plie por eldoni du konferencajn kajerojn, unu por la Alp-Adria Konferenco kaj la alian por IEK '98 de OSIEK. Sekve de vere impona kaj laŭdinda serĉ-laboro de Cynthia Zobeni kaj de la helpo de Eraldo Sepulcri por la grafika kaj kompostada partoj, estis eblo publikigi la broŝuron TRIESTE ROMANA, kaj dank' al la laŭd-merita tradukado de Pier Giorgio Soranzo, ĝi aperis ankaŭ en Esperanto. LA ROMEPOKA TRIESTO estis donacita al la konferencanoj.

Post la malapero de LA ETA GAZETO, estis decidite aperigi simplan asocian informilon, nomitan TEA-BULTENO, kiu en la pasinta jaro aperis 10 fojojn.

La 4$^{an}$ de decembro TEA-anoj kunvenis por eksterordinara Asembleo, dum kiu estis deciditaj kelkaj ŝanĝoj en la societa statuto, sekve de nova leĝo pri reguligo de senprofitcelaj, nekomercaj asocioj. Post tio, en nuna 1999$^{a}$ jaro, ni povos enskribiĝi en la regiona listo de la volontulaj asocioj.

En aprilo okazis en Krasnojarsk ekspozicio de infanaj desegnaĵoj pri la temo DE KORO AL KORO, en kiu partoprenis gestudentoj de la triesta elementlernejo L. SUVICH. Flanke de TEA, oni sendis grafikaĵon faritan de Eraldo Sepulcri, kiu estis tiom aprezita de la organizantoj, ke ĝi estis elektita kiel emblemo de tiu ekspozicio, ĉiujare aranĝota en tiu fora urbo de Siberio.

Per ĉi tio mi finas mian raporton, dankante vin pro la atento.

# Raporto de Triesta Katedrestro

*Elda Doerfler*

La triesta katedro kunlabore kun TEA organizis, kadre de la 10$^{a}$ Alp-Adria Esperanto-Konferenco en *Lignano Sabbiadoro*, **Seminarion pri instruado**, gvid-itan de Stefan MacGill. Aliĝis dek tri personoj plus tri komencantoj. Vere ĉio bone funkciis, danke al la vervo kaj eminenta kapablo de la fama kurso-trejnisto.

En februaro oni programis komenci novan elementan kurson, sed malgraŭ la klopodoj neniu enskribiĝis.

La 30$^{an}$ de marto okazis unua-grada ekzameno por 4 kursfinintoj. Ĉiuj brile sukcesis.

Dum la tuta jaro, escepte de la someraj monatoj, ĉiulunde okazis **konversacia kurso**, kaj, por ekzercigi novulojn kaj jam spertulojn, oni enprogramigis por la vendredaj vesperoj **ekskurson tra la vortaro**, dum kiu oni lernadis nekonatajn vortojn pri diversaj elektitaj temoj.

La instruistino Maria Rosati tre sindoneme prizorgas la konversacian rondon.

Oni klopodis, fine de la pasinta jaro, ekhavi kontaktojn kun la provinca studestro, havigante al li plurajn informojn pri la lingvo kaj pri la diversaj studebloj por instruistoj, plus la libron LUDU KUN NI, uzeblan por elementlernejanoj. Ĝis nun nenia reago. En programo tamen estas ekagi ankaŭ ĉe kelkaj lernejaraj direkcioj, proponante interalie partoprenon en konkurso pri desegnaĵoj por elementaj kaj mezgradaj gestudentoj.

Lamis bedaŭrinde la agado en instrua kampo ĉefe pro manko de taŭga propagandebleco: ni esperu ke en ĉi tiu jaro ni estu pli bonŝancaj.

# Elektoj dum la Jarasembleo

Surbaze de la statuto lastatempe akceptita, unu el la proponoj de la eliranta, sep-homa, estraro estis la malpliigo de la nombra konsisto de la membroj al kiuj estas konfidita la gvidado de TEA. La asembleo aprobis tiun redukton. Tial, post la balotado, rezultis elektitaj por la jaro 1999$^{a}$ la jenaj kvin personoj:


## *Estraro*

**Ackermann Edvige** - *prezidanto*
**Zerpini Elena** - *vicprezidanto*
**Doerfler Elda** - *sekretario*
**Valle Giuseppe** - *kasisto*
**Rustici Annamaria** - *konsilanto*

## *Administraj revizoroj*

**Nocent Elio kaj Zerpini Amalia**

Ĉiu stiranto de nia malnova sed ĉiam juna ŝipo TEA ricevu plej varmajn bondezirojn de bona laboro en harmonia etoso kaj de firma, neflankiĝanta direktado por la bonsukceso de Esperanto!



**Amikeco trans limoj**

Festante la SEMAJNON DE INTERNACIA AMIKECO, unuafoje okazintan en februaro 1969 pro la iniciato de la sveda esperantisto Erik CARLÉN, oni deziras atentigi pri la valoro entenata en ties devizo: Amikeco trans limoj - limoj naciaj, rasaj, lingvaj, kulturaj, politikaj kaj religiaj. Unue ĝiaj celoj estas plifortigi kaj plivigligi la kontaktojn inter esperantistoj en la diversaj landoj; due informi pri niaj lingvo kaj movado en neesperantistaj rondoj.

En Triesto ni jam eklaboras por akcepti proksimajn kaj malproksimajn geamikojn. Jen skize kaj koncize nia programo: je la 10$^{a}$ horo proksimume, vizito al la Paperfabriko *Burgo* en *Duino*, kiu daŭros ĉ. du horojn. Poste, je la 12.30-13$^{a}$ horo tagmanĝo ĉe favorpreza bongustumejo (Agroturisma Bieno). Fine ĝuinda promenado en la bela ĉirkaŭaĵo, kun vizito eĉ al la Templo de la Dio Mitrao, apud la fonto de la rivero *Timavo*.

Ĉiu estos bonvene kaj varme akceptata: nepras tamen, por sukcesa organizado de la aranĝo, antaŭanonci sin ĉe TEA-sekretariino, kaj por la grupa vizito kaj por antaŭmendo de la tagmanĝo.

## Plej freŝaj novaĵoj pri la 11ª Alp-Adria E-Konferenco

*Marija Beloŝeviĉ*

Jam estis kontaktitaj la Ministerio pri kulturo kaj tiu pri eksteraj aferoj, kiu i.a. promesis helpi kaj/aŭ peri petojn kaj informojn al la Kunordiga Alp-Adria Komitato.

La Konferenco okazos en Istrio: post enketado pri hotel-prezoj, oni decidos el inter Rovinj, Umag, Pula aŭ Porec. Plej probable, post interkonsento kun la aliaj Esperanto-komitatanoj, la aranĝo estos organizita de la 30ª de septembro ĝis la 3ª de oktobro 1999.

La konferenca temo estos: «Minoritatoj en Alp-Adrio: kulturaj rajtoj». Lige al tiu temo oni organizos ekspozicion pri la minoritatoj en la regiono kaj - eble - rondan tablon kun ĉeesto de reprezentantoj de la malplimultoj en Kroatio.

Do, ŝajnas ke la afero ekmarŝas ĝustadirekten: ni subtenu ĉion ĉi per kiel eble plej frua kaj multnombra aliĝo!

## INTERNACIA KONKURSO DE INFANDESEGNAĴOJ

La Kulturdomo de Milanowek (Pollando) kaj la loka Esperanto-Grupo invitas infanojn kaj geknabojn de la tuta mondo partopreni en la konkurso pri desegnaĵoj, organizita kunlige kun la centjariĝo de la urbo Milanowek, kies temo estas: **Mia malgranda patrujo**.

1. Ĉiu partoprenanto prezentas sian ĉirkaŭaĵon, aŭ scenojn pri ĉiutaga vivo, tipaj festoj, kutimoj k.s.
2. En la konkurso povas partopreni ĉiu ajn infano/knabo laŭ la jenaj kategorioj:
   - grupo B: 6 - 9 jaroj
   - grupo B: 10-12 jaroj
   - grupo C: 13-15 jaroj
   - grupo Ĉ: 16-18 jaroj
3. Ĉiu rajtas sendi sendi du konkursaĵojn.
4. Formato de la desegnaĵo: ĉ. A3.
5. Realig-tekniko laŭ propra plaĉo:
   - desegnaĵo nigra-blanka aŭ farita per kolor-krajonoj;
   - pentraĵo per farboj, oleofarboj aŭ akvarelo;
   - kombinaĵo kun aplikaĵoj: ekz. surgluitaj folioj, florpetaloj, rizograjnoj k.s.
6. Limdato de sendado: **15ª de aprilo 1999.**
7. Al ĉiu aĝogrupo estos atribuitaj 3 premioj de ĵurio konsistanta el instruistoj pri arto, pentristoj kaj skulptistoj k.a.

Oni sendu la materialojn al:

**Miejski Osrodek Kultury - ul. Koscielna 3**
**PL-05-822 Milanowek - Pollando**

Pliajn informajn detalojn donas, en Triesto, TEA-sekretariino.

## MALLONGE PRI. . .

**UECI donacas monon!**

UECI (Itala Katolika Esperantista Unuiĝo) disponigas la sumon de 1.500.000 liroj, dividendan inter tri gejunuloj, je aĝo inter 18 kaj 30 jaroj, membroj de UECI aŭ IKUE, kiuj posedas la tria-gradan diplomon de Esperanto. La premio de po 500.000 liroj estos kiel kontribuo por partopreno en la kongreso de IKUE aŭ alia ekumena Esperanto-kongreso. Interesiĝantoj sin alturnu al:

D-ro **Serio Boschin** - Via Eritrea 8 - IT-31100 Treviso
tel/fakso 0422 235381

**Esperanto en la telefon-libro**

En la nova telefonlibro en Budapeŝto (HU), je paĝo 15ª, inter la fremdlingvaj ĝeneralaj informoj aperas ankaŭ tutkolumna esperantlingva teksto (krom la angla, germana, franca, itala kaj rusa lingvoj). La apero de informoj en la internacia lingvo estas grava ne nur pro la fakta utilo, sed ĉefe pro ĝia modela valoro. Surbaze de tio ankaŭ alilandanoj povas peti aperigon de io simila en tiuj eldonaĵoj de publika intereso, atentigante pri la jam ekzistantaj esperantlingvaj materialoj kaj en la fervojaj horarlibroj kaj nun en la telefonlibro en Hungario.

**Por muzik-amantoj**

Kaze de vizito al Vieno kaj al la loĝejo de Beethoven, nepre petu la testamenton de la eminenta muzikisto en la Esperanta versio. La domo troviĝas en la 19ª distrikto, Probusgasse 6, atingebla per la buso 38 A.

**ANONCO** ➔ **D-ro Eduardo Arias Fanseca**, pediatro kaj specialisto en nefrologia fako (ne transplantado), serĉas profesiajn kontaktojn kun kolegoj mondskale. Li loĝas en Contramaestre kaj laboras en Santiago de Cuba. Estante komencanto, li preferas, en la unuaj rilatoj, uzi la anglan aŭ hispanan lingvojn. Interesatoj skribu al la jena ret-adreso: brossard@his.scu.sld.cu

**Esperanta Turisma Societo Ljubljana**

Tavĉarjeva 2
1000 Ljubljana

**Februara programo**
Ĉiuĵaŭde je la 19.30 horo

| | |
|---|---|
| **04.02** | Kultura Tago: Solenaĵo honore al d-ro France **Preŝeren** |
| **11.02** | Jara Asembleo |
| **18.02** | Lingva vespero |
| **25.02** | Nederlando en diapozitivoj |

Ha avuto inizio un
**CORSO ELEMENTARE**
**DI ESPERANTO**
giovedì **28 gennaio 1999**
Le lezioni hanno luogo presso la sede
dell'ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA
in via F. Crispi n. 43 - 1° piano
ogni giovedì dalle ore 19.00 alle 21.00.

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128; reto: nored@iol.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro
Poŝtĉekkonto N° 10834349

# FEBRUARO 1999

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Lundo | 1<br>TUBESHVAT | 8 | 15 | 22 |
| Mardo | 2 | 9 | 16<br>CHUNJIE | 23 |
| Merkredo | 3 | 10 | 17 FESTO DE RELIGIA LIBERO<br>CINDRO-MERKREDO | 24 |
| Ĵaŭdo | 4 | 11 | 18 | 25 |
| Vendredo | 5 | 12 | 19 | 26 |
| Sabato | 6 | 13 | 20 | 27 |
| Dimanĉo | 7 | 14<br>SHIVARATRI | 21<br>$1^{A}$ DIMANĈO DE KARESMO | 28 |


# FEBRUARO 1999

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Lundo | 1<br>TUBESHVAT | 8 | 15 | 22 |
| Mardo | 2 | 9 | 16<br>CHUNJIE | 23 |
| Merkredo | 3 | 10 | 17 FESTO DE RELIGIA LIBERO<br>CINDRO-MERKREDO | 24 |
| Ĵaŭdo | 4 | 11 | 18 | 25 |
| Vendredo | 5 | 12 | 19 | 26 |
| Sabato | 6 | 13 | 20 | 27 |
| Dimanĉo | 7 | 14<br>SHIVARATRI | 21<br>$1^{A}$ DIMANĈO DE KARESMO | 28 |

## 5759 HEBREA JARO

**1** - TUBESHAVAT.
Novjartago de la arboj kaj festo de naturo-vekiĝo. Tradicie oni manĝas la kamparajn primicojn.

## 2559 BUDHISTA JARO

**16** - CHUNJIE (novjartago en Ĉinio).
Dank-tago al la praavoj pro ĉio bona ricevita dum la pasinta jaro. Je noktomezo oni eksplodigas artfajraĵojn por fuĝigi la malbonajn spiritojn. La tutan nokton oni maldormas, ĉar antikva kredo diras, ke kiu plej longtempe restas veka, tiu plej longtempe vivos. La infanaro ricevas donace de siaj gepatroj monon, enmetitan en ruĝan koverton. Estas la tago de familiaj kunvenoj kaj de grandaj bankedoj. Laŭlonge de la stratoj serpentumas grandaj kaj buntaj drakoj, konstruitaj per silko, papero kaj ligno.

## 2054 HINDUISMA JARO

**14** - SHIVARATRI.
La nokto de SHIVA: jen speciala momento, tre atendita de ĉiuj hinduoj, dum kiu oni povas honori la Dion SHIVA. La piuloj pasigas la tutan nokton meditante kaj legante la sanktajn tekstojn, kantante, preĝante kaj oferante al la Dio fruktojn, florojn, lakton kaj foliojn de *betel*.

## 1999 KRISTANA JARO

**17** - CINDRO-MERKREDO (KATOLIKA).
Fino de Karnavalo kaj komenco de Karesmo. Laŭ la ambrozia rito Karnavalo finiĝos la postan sabaton.
**17** - FESTO DE RELIGIA LIBERO (VALDA).
Oni memorigas ke la $17^{an}$ de februaro 1848 la reĝo Carlo Alberto rekonis al la membroj de la Valda Eklezio la civilajn rajtojn.
**21** - $1^{A}$ DIMANĈO DE KARESMO (ANGLIKANA, KATOLIKA).
Karesmo konsistas el kvardek-taga periodo, dum kiu oni preĝas kaj pentofaras prepare al la Pasko.

## 1419 ISLAMA JARO

## 5759 HEBREA JARO

**1** - TUBESHAVAT.
Novjartago de la arboj kaj festo de naturo-vekiĝo. Tradicie oni manĝas la kamparajn primicojn.

## 2559 BUDHISTA JARO

**16** - CHUNJIE (novjartago en Ĉinio).
Dank-tago al la praavoj pro ĉio bona ricevita dum la pasinta jaro. Je noktomezo oni eksplodigas artfajraĵojn por fuĝigi la malbonajn spiritojn. La tutan nokton oni maldormas, ĉar antikva kredo diras, ke kiu plej longtempe restas veka, tiu plej longtempe vivos. La infanaro ricevas donace de siaj gepatroj monon, enmetitan en ruĝan koverton. Estas la tago de familiaj kunvenoj kaj de grandaj bankedoj. Laŭlonge de la stratoj serpentumas grandaj kaj buntaj drakoj, konstruitaj per silko, papero kaj ligno.

## 2054 HINDUISMA JARO

**14** - SHIVARATRI.
La nokto de SHIVA: jen speciala momento, tre atendita de ĉiuj hinduoj, dum kiu oni povas honori la Dion SHIVA. La piuloj pasigas la tutan nokton meditante kaj legante la sanktajn tekstojn, kantante, preĝante kaj oferante al la Dio fruktojn, florojn, lakton kaj foliojn de *betel*.

## 1999 KRISTANA JARO

**17** - CINDRO-MERKREDO (KATOLIKA).
Fino de Karnavalo kaj komenco de Karesmo. Laŭ la ambrozia rito Karnavalo finiĝos la postan sabaton.
**17** - FESTO DE RELIGIA LIBERO (VALDA).
Oni memorigas ke la $17^{an}$ de februaro 1848 la reĝo Carlo Alberto rekonis al la membroj de la Valda Eklezio la civilajn rajtojn.
**21** - $1^{A}$ DIMANĈO DE KARESMO (ANGLIKANA, KATOLIKA).
Karesmo konsistas el kvardek-taga periodo, dum kiu oni preĝas kaj pentofaras prepare al la Pasko.

## 1419 ISLAMA JARO